FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie

- Nº 62 -          - Avril 1962 -

Redaktas : Sro HANNIER, 250, boul. Jean Jaurès-ROUEN




# PENSANTE PRI LA KONGRESO...

Printempo ! Kion signifas tiu vorto ? Por ĉiuj : renaskiĝon de la naturo;sed,por la U.N.E.-estraranoj;ĝi indikas,krome,ke rapide alproksimiĝas la dato de la regiona kongreso.

Multe da laboro estas jam farita de la L.K.K.,t.e.de niaj anoj en Rouen kaj ties ĉirkaŭaĵoj.Pluraj novigaĵoj faros tiun kongreson neordinara.Sed,plezuron informi vin,mi volas lasi al la organizantoj.

Spite malkvietaj tagoj,kelkaj kamaradoj lasis flanke siajn timzorgojn proprajn,streĉante siajn fortojn al sukceso de la kongreso.Tial, ni devas esti al ili dankemaj.

Kial fari kongreson ? Car estas kutimo ? -Ne ! Por ke la Normandaj Gesamideanoj renkontiĝu ? Tio ja pli valoras ! Sed Esperanto-Kongreso estas,precipe FIDO-AGO en la Homo.Ni,Geesperantistoj,devas aserti pli il iam,ke homoj povas kaj devas vivi paĉe.Kiel faris ZAMENHOF,ni kondamnas la militon kaj,despli prave,la krimojn bestajn fare de homaĉoj kiuj volus,perforte,forigi liberecon.HOMEDO NE PLU ESTAS SEN LIBERECO.

Sed,ĉu Printempo ne enhavas en si Esperon ? Tial,karaj geamikoj,mi fidas la Samideanaron.Restu ĉiam unuiĝintaj,ne nur en nia regiona movado sed,ankaŭ en naciaj kaj internaciaj asocioj.Esperanto estas afero neloka,sed UNIVERSALA TUTMONDA.Tiel vi nepre devas esti anoj de la internaciaj asocioj.

Eble vi opinias ke Printempo vekas strangajn ideojn en mia cerbo ? Tamen,mi esperas ke vi legis tiujn kelkajn liniojn kiuj rememoras (precipe al la novbakitaj esperantistoj ) ke Esperanto estas pli ol simpla lingvo,ke Doktoro ZAMENHOF estis,estas kaj estos bonfaranto de l'homaro.

Ĝis baldaŭ en ROUEN !

Maurice HUET
Prez.de U.N.E.

# AL ĈIUJ GEJUNULOJ : MIA UNUA INTERNACIA KONGRESO

Je la fino de la pasinta jaro,mi ĉeestis la kvinan Internacian Seminarion de Germana esperanta junularo en Kolonjo.Ni estis proksimume 60 gepartoprenantoj el dek tri landoj.

Bedaŭrinde mi estis la sola reprezentino el Francio.Tiu kunveno daŭris unu semajnon.La temo estis :"Usono kaj Soveta Unio ".Cu eblas kunekzistado de la du kontraŭaj socisistemoj ? Profesoro Doktoro LAPENNA,sekretario de U.E.A.,kaj Profesoro LAURAT,de Pariso,parolis pri tiu grava,aktuala problemo.Tiuj paroladoj kaj komunaj diskutadoj estis tre interesaj kaj instruaj.Inter ili,ni havis distraprogramon kiel vizito de Kolonjo,de la urbo Bonn,koran akceptadon de Esperanto Unuiĝo Grand Kolonjo en restoracio,ekskurson en arbaro proksime de Kolonjo,prezentadon de lumbildoj kaj fin finesilvestran balon.

(daŭrigo paĝo 4)

# LA KONGRESO

## GRANDE SALLE DES FETES
## HOTEL DE VILLE

SAMEDI 5 MAI 1962

I4 h :-Ouverture de la permanence d'accueil.
 -Ouverture du bureau de poste temporaire (Hall d'honneur)

I6 h :-Départ du premier groupe pour la visite de la ville et du Musée Jeanne d'Arc (gratuite)

I8 h :-Fermeture du bureau de poste temporaire.

I8 h 30 :-Réception par la Municipalité rouennaise.

2I h :-Causerie par Mme VINCENT, des Andelys, (sur invitations) à l'intention des membres de l'enseignement.

23 h :-Bal privé au Salon des Familles (Dancing Le Grillon) boulevard de l'Yser (à 50 m de la place Beauvoisine)
 -Election de "Fraŭlino Esperanto " et ses demoiselles d'honneur.

DIMANCHE, 6 MAI 1962

8 h 30 :-Ouverture du bureau de poste temporaire.

9 h :-Ouverture du Congrès régional U.E.N.

9 h 30 :-Ouverture du " 3I e CONGRES NORMAND D'ESPERANTO" par le Président HUET.
 -Rapports des Délégués - Actions de propagande -Election du bureau 1962-63.

I2 h :-Clôture du Congrès - "La Espero" - Photographie traditionnelle des Congressistes.
 -Fermeture du bureau de poste temporaire.

I3 h :-Banquet de I00 couverts à la "Brasserie du Théatre Français" place du Vieux Marché (9,50 NF, tout compris) - "La Espero"

I5 h :-Départ du second groupe pour la visite du Musée Jeanne d'Arc et de la ville.

(Le reportage photographique des diverses phases du Congrès sera assuré par A.BARON)

UEN INVITAS VIN -- ROUEN INVI

# QUELQUES NOTES...

+NE TARDEZ PAS POUR ENVOYER VOTRE INSCRIPTION AU TRESORIER:

Sro BUISSON - IO, rue François Blanchard -MAROMME (Seine Mme)

Compte courant postal: GROUPE ESPERANTISTE ROUENNAIS (sans autre précision d'adresse) ROUEN Nº 2086.24

+DES VOTRE ARRIVEE, FAITES-VOUS CONNAITRE A LA PERMANENCE D'ACCUEIL.

+NE PERDEZ PAS LE MACARON QUI VOUS SERA REMIS, IL SERA INDISPENSABLE POUR PENETRER AU DANCING.

+SI, LORS DE VOTRE INSCRIPTION, VOUS N AVEZ PAS ENCORE DECIDE DE PARTICIPER AU BANQUET, FAITES CONNAITRE VOTRE DECISION AU BUREAU D'ACCUEIL, SITOT VOTRE ARRIVEE - HATEZ-VOUS, CAR LE RESTAURANT NE PEUT RECEVOIR QUE IOO CONGRESSISTES(les premiers inscrits).

+ ADRESSEZ, DES QUE POSSIBLE, VOS SUGGESTIONS DE TOUS ORDRES AU SECRETAIRE DU CONGRES:

Sro HANNIER
250, boul. Jean Jaurès
ROUEN

Parmi les questions déjà notées figurent:

-quel titre donner à notre bulletin ?

-quelle forme de propagande adopter pour la prochaine reprise des cours en octobre ?

etc...

+ POUR RASSURER LES PARENTS DE NOS JEUNES CONGRESSISTES, DISONS TOUT DE SUITE QUE LE BAL SERA STRICTEMENT RESERVE AUX ESPERANTISTES.

+ N'OUBLIEZ PAS DE REGARDER SI VOUS N'AVEZ...RIEN OUBLIE...

## AL CIUJ GEJUNULOJ .

### MIA UNUA INTERNACIA KONGRESO.

(daŭrigo)

Estis tre simpatia povi interŝangi ideojn kun multe da gejunuloj el diversaj landoj. Kiam ni estis en trinkejo ni mirigis kelkajn trinkulojn klarigante ilin. La dek tri nacieco j povis kompreniĝi per nur unu lingvo. Sed mi tre bedaŭris ke la francaj gejunuloj ne estis pli multaj.

Tiuj renkontoj kun eksterlandanoj estas tre fruktedonaj pri ĉiuj temoj. Mi sincere invitas ĉiujn gejunulojn partopreni ofte internaciajn kongresojn. Oni tute ne devas timi eĉ se oni estas mallerta ĉar oni amikiĝas rapide kaj precipe oni lertiĝas samtempe en simpatia medio. Do unue, aliĝu al la franca kaj internacia junularo organizacioj .

Denise BUHOT -ROUEN

## Notre Congrès à la radio.

MM. JOUIS et LOISEL, respectivement Président du Groupe de Rouen et Président du Groupe des Fervojistoj de Sotteville, ont eu l'avantage de l'interview mené par Yvon PAILHES. L'enregistrement a eu lieu récemment à Rouen. Il sera diffusé.

soit le mardi I7, soit le mardi 24 avril, à I2 h 35 sur

ROUEN-LOUVETOT (2I3 m)
et
CAEN M.F. (9I,53 Mcs)

dans le cadre de l'émission "NORMANDIE-MAGAZINE "

Ecoutez les amis rouennais!

Pour ne pas manquer cette émission, consultez "PARIS-NORMANDIE" des I7 ou 24 avril.

# RANCISKO LA ETA ŜAFISTO

(daŭrigo kaj fino)

## LA TAGOJ

Ho ! Neniam Francisko enuas sur la kampoj !

Kiam la ŝafoj estas trankvilaj,li amuziĝas la tutan tagon.Li konstruas dometojn per ebenaj ŝtonoj kaj koto,kiun li knedas en siaj manoj.Li skulptas fajfilojn en la ŝelo de la junaj branĉoj.Li resaltigas ŝtonetojn sur la lageton,aŭ,kelkfoje,li nenoin faras:li kuŝiĝas sur la dorso ĉe la piedo de muro de seka ŝtono.La suno,jam alta,lin varmigas.Li fermas la okulojn,kvazaŭ li dormus.Tra siaj fermitaj palpebroj,li vidas aĵojn...brilantajn aĵojn,kiuj supreniras,malsupreniras,dancas.Ili havas ĉiujn kolorojn.Se li malfermas la okulojn,li ne plu vidas ilin.

## LA AVENTUROJ

Tamen okazas malbonaj tagoj en la vivo de eta ŝafisto.

Iam,Francisko paŝtis apud la Riou.Unu ŝafido eniris arbustaron por tondi aron de molaj folioj.Ĝi ne plu povis eliri el tiu arbustaro.La dornoj sin kroĉis al sia lano kaj tenis ĝin mallibera.Ĝi certe blekis; sed la bruo de la Riou,kiu estas akvoplena printempe,malhelpis,ke oni ĝin aŭdu.En la vespero,Francisko revenis kun sia ŝafaro tra la Casse-de Cusse.Li estis nenion rimarkinta. Eliza estis kun li.En momento,ŝi diris :

-Sed,Francisko,ŝajnas ke via "senharulo" ne estas ĉi-tie ! Ĉu vi lasis apud la Riou ?

Estis vere :mankis unu ŝafido ! Francisko estis tre maltrankvila.Li timis esti riproĉata alvenante hejmen.

La nokto alproksimiĝis; neeblis reiri.Francisko pensis:

-Mi estus devinta ĝin porti,kiel kutime.Ĝi ne estas tre lerta...Mi tiel ĝin portis,ke ĝia lano flanke eluziĝis kontraŭ mia vesto;pro tio oni nomas ĝin "senharulo".Sed,kion diros paĉjo ? Mi timas ricevi bonan "rouste"...

Sed la gepatroj de Francisko ne riproĉis lin.Kiam ili estis malgrandaj kaj paŝtis siajn ŝafojn,kiel Francisko,okazis ankaŭ al ili aventuroj.

La morgaŭon,Francisko retrovis la senharulon en sia arbustaro. Ĝi certe estis provinta eliri.Laneroj estis alkroĉitaj al la branĉoj.

Alian fojon,Francisko paŝtis en Chalou.Pluvis,sed oni ja ne reiros al la ŝafejo pro kelkaj pluvgutoj.La bestoj,kun sia lanvesto,ne malsekiĝas; des malpli bone por la ŝafistoj.

Francisko malgajiĝis.Esti sola ĉagrenigis lin.Li dezirus,ke Henriko venu kun li.Li rigardis,li aŭskultis...Sed nenio ! Nenio,krom la bruo de la pluvo sur la folioj !...

Tiam,Francisko ankoraŭ pli malgajiĝis.Subite,je la supro de la deklivo de Chalou,li aŭdis bojadon de hundo,estis Blankpiedulo,la hundo de Henriko; kaj estis ankaŭ Henriko kun sia ŝafaro.

Francisko estis ĝojplena ! Li vokis lin:

-Hu!...Hu !..Henriko !...

Henriko venis.Ili milsis siajn bestojn.

Post momento,la patrino de Francisko alvenis.Ŝi alportis al li buterpanon.Francisko ankoraŭ nun diras:

-Tiu butero sur tiu pano, tio estis tre bongusta !...

TRADUKIS EL LA FRANCA : S-ino J.VINCENT I3,av.De Gaulle LES ANDELYS

## AMIKO

Nun,Francisko paŝtas kun Henriko.Henriko tion deziras,kaj neniam li incitas lin.Li estas granda:dekQepjara.Li sciasfari,per nenio,amason da objektoj: dometoj,fajfiloj,pontoj...

../..

## FRANCISKO LA ETA ŜAFISTO (daŭriĝo)

Li ĉiam havas en sia poŝo aĵojn, kiujn oni bezonas. Li ludas kun Francisko. Henriko estas la gardisto: li klopodas kapti sian amiketon hakanta arbon. Li faras protokolon, kiun Francisko pagas per folioj.

Francisko bone scias, ke Henriko, kiu estas granda, faras tiujn ludojn por amuzi lin, kiu estas malgranda. Tial li amas lin. Krome, kun Blankpiedulo, oni ne multe penas por paŝti.

### FELIĈA ŜAFISTO.

Ho ! nun Francisko ĝojas esti ŝafisto ! De kiam la bela vetero tute venis, estas pli bone ekstere ol en la lernejo.

Ciumatene, li foriras kun Henriko. Kelkoje la junulinoj, Eliza, Iva, akompanas ilin. Ili supreniras la ŝtonplenan vojeton. La ŝafoj iras antaŭe, tondante herberon aŭ molan folion.

Kiam ili alvenas al la Berrière, ŝajnas, ke ili estas malproksime de S-ta Margareta. La Riou, plenigita de la neĝofandiĝo, eliras muĝante el la proksima arbaro, surŝprucigas la ŝtonojn kaj la arbustarojn per malvarmaj gutetoj. Poste la vojeto enprofundiĝas sub la arbojn.

Francisko estas feliĉa !

Dum la ŝafoj paŝtiĝas, li sidas sur muska ŝtono. Li rigardas vivi la arbarajn bestetojn. La formikoj, la kokcineloj rapidas en la maldika herbaro. Abelo iras zumante.

### LA LASTA TAGO

Estas la lasta tago, kiam Francisko paŝtas.

La herbo certe estas alta sur la montoj, kaj morgaŭ ĉiuj ŝafoj de la vilaĝo supreniros al l'Oriol. Ili tranoktos supre en la valoj de l'Alpevin aŭ sur la Moutière.

Hodiaŭ, Francisko paŝtis en Clot-Civière. Mario venis kun li. Ili ne plu malamikiĝas.

Li ne bone scias ĉu li ĝojas aŭ ne, ke lia ŝafista vivo finiĝas por ĉi-jaro. Okazis malbonaj tagoj kiam estas malvarme, kiam la malvarmega printempa vento frostigas la orelojn, kiam pluvas, estus pli bone en la lernejo kun la kamaradoj. Sed la bonaj momentoj, kiujn oni pasigas ŝirme de la mor ĉirkaŭ lageto, aŭ en la arbaroj !...

Nu ! Estas finite por ĉi-jaro !...

Tamen ducentfrankan moneron Francisko gajnis por sia patro.(+)

(+) Tio estis en 1929.

-FINE -

# NIA VIVO

-LE HAVRE :-Daŭras la kursoj. Ne multaj, sed bonaj gelernantoj.

-ROUEN : - Le groupe avait l'espoir de provoquer l'inauguration d'une "Rue Zamenhof " à l'occasion du Congrès, mais hélas, pour l'instant, aucune voie n'attend sa dénomination Il faut attendre...

- Une "Nuit de l'Esperanto" sera organisée l'hiver prochain avec le concours d'un orchestre...N° I.

### POSTKARTOJ " FRANCE -Unua Tago"

Tiu eldono de l'Unuiĝo Normanda estis sukceso. Nur kelkaj tagoj post la..."nunua tago", ne plu estis eĉ unu karto. Ni petas pardonon al ĉiuj kiujn ni ne povis kontentigi.

# attention !

Si une croix figure dans un des carrés ci-dessous, cela signifie que vous êtes en retard d'une année dans le réglement de votre cotisation à U.E.N. (deux croix = deux ans) - Alors, vite, envoyez 2 NF par année à : U.E.N. 63, boulevard François Ier -LE HAVRE - CCP Rouen 283 -40

| 1960 | 1961 |
|---|---|
| | |

3I an ESPERANTO NORMANDA KONGRESO

ROUEN -- 5 /6 de majo I962

Grande salle des fêtes de l'Hotel de Ville

Réservé secrétariat :

# BULLETIN D'ADHESION

(encadrer les réponses qui conviennent)

NOM : Prénom :

ADRESSE COMPLETE :

PROFESSION : age :

- JE DESIRE QUE ME SOIT RESERVEE UNE CHAMBRE EN HOTEL POUR LA NUIT DU 5 au 6 MAI : OUI - NON
  Si oui : en catégorie 2 étoiles - I étoile - sans étoile
  Si oui : chambre I lit une personne - I lit deux personnes
  Autres désirs pour la nuit du 5 au 6 mai :camping -A.J. -

- J'AI L'INTENTION D'ARRIVER : par le train -par autocar - par voiture personnelle - par deux roues - vers heure

- JE SERAI ACCOMPAGNE DE PERSONNES DE MA FAMILLE pouvant adhérer à prix réduit (joindre les bulletins d'adhésion complémentaires - I par personne sur papier commercial 2I X 27)
- J'ASSISTERAI A LA RECEPTION le samedi 5 mai à I8 h 30;OUI -NON
- JE PARTICIPERAI AU BANQUET DU DIMANCHE 6 MAI : OUI - NON
  ( 9,50 NF tout compris -Attention!le total des repas est limité à IOO personnes,dans l'ordre des inscriptions)

- JE VISITERAI LE MUSEE JEANNE D'ARC : (gratuit) : OUI - NON

- JE PARTICIPERAI A LA VISITE DE LA VILLE (à pied) : OUI - NON

- JE VERSE CE JOUR au "GROUPE ESPERANTISTE DE ROUEN "
  par chèque postal (joindre les 3 voletsdu chèque de virement)
  par chèque bancaire sur la banque
  par mandat-chèque de versement

  la somme de NF
  dont détail ci-contre :
  -Adhésion au Congrès du souscripteur .........
  -Adhésion de membres de la famille....
  -Prix du banquet pour personnes

à le

Signature: